Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

PLENUMITA 21/01/2015 Ducent kvina eldono 21/01/2015 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Nicole Else



SENDATA AL 275 La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisnunigitan informon **ABC nova**

Ctrl+alklaku la verdajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Esperantajn ligojn

Ctrl+alklaku la bluajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Anglajn ligojn

Pasintaj numeroj de 'A E' http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

★ ★

Esperanto-ŝlosilo Uzu, fordonu, semu Esperanto-semojn. EFNSK havas kopiojn.

Du pecoj de A4 papero bezonataj por presi la 32-paĝan libreton http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo



Estontaj kompetentaj Esperantistoj

aŭskultas la retradion (Esperantujo) ĉiun tagon

http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine

Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj tage Klaku, Aŭskultu, Spertiĝu

58. LA GRAMATIKO DE ESPERANTO

LA PREPOZICIOJ. Ĉ.



1e. Por la signifo "apartenanta al" kaj "rilatanta al" teni la prepozicion "de", ekz. "La biciklo de mia onklo" kaj "La premio oferita de la klubo".

2e. Por la signifo de malligo la prepoziciojn "el" kaj "el de" kaj "for de" (NE la malĝustan "disde"!), ekz. "La foriro for de siaj gepatroj" kaj "La libro el de la patro".

3e. Por la signifo de la aganto de la ago la prepoziciaĵon "ate de", ekz. "La murdo ate de la policano" (= la policano murdis), kaj "La fotografaĵo ate de mia frato" (= mia frato fotografis).

4e. Por la signifo de la objekto de la ago la prepoziciaĵon “ante al” (aŭ “ante” + akuzativo), ekz. “La murdo ante la policanon” (= oni murdis la policanon), kaj “La fotografaĵo ante al mia frato” (= oni fotografis mian fraton).
Anstataux “ate de “ kaj “ante al” povas plu uzati “de”, se la signifo estas klara.

Marcel Leereveld.

Sendu viajn fejsbukajn Esperanto-novaĵojn ankaŭ al la Novaĵletero.



Novaĵoj pri la Esperanto-Doma Gastdormejo

La ĉefa rolo de la Gastdormejo estas helpi la anojn de EFNSK ĉeesti EFNSKajn kunvenojn.
per eventuala dumnokta dormloko ĉe ED post aŭ antaŭ la kunvenoj.
La **GASTDORMEJO** de EFNSK devas esti antaŭmendita de estontaj Esperantistaj gastoj.
Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn.
Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin prepari la gastdormejon.
Sendu ĉiujn petojn por resti ĉe la gastdormejo al la Sekretario per retmesaĝoj al:
gymea@hotmail.com; rspring@tpg.com.au; **kaj** nsw@esperanto.org.au;

Esperanto-Domo Sidnejo



La unuan de Marto 2015 okazos la venonta kunveno

Merkredon la 18an de Feb venis Roger Springer kaj Ian Wylles kiuj faris kelkajn domajn riparojn kaj Margaret Chaldecott kiu laboris farante ĝeneralajn oficejajn taskojn.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Interesaj intervjuoj kun denaskuloj.



https://www.youtube.com/watch?v=UzDS2WyemBI

Amike, Nicole

AEA Informas

Aŭstralia Esperanto-Asocio

ACN 121 495 789 C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

La venontaj Skype kunvenoj estos jaŭde 26/02, 19/03, 09/04, 30/04, 21/05, 11/06, 02/07, 23/07

"Dankon al kongresanoj.

Dorothy Enderby sendis varman leteron en kiu ŝi dankis pro la kondolenckarto kiun Sandor Horvath organizis post kiam la AEA-NZEA kongreso aŭdis la malfeliĉan novaĵon pri la morto de Kep Enderby.

Dorothy diris 'Mi alte taksas la elkorajn salutojn de la kongresanoj'
kaj sendis al ni bonajn dezirojn."

Sendis Hazel Green

Ĵunko vizitis ankaŭ Adelajdon



Post restado en Melburno japana esperantistino Ĵunko vizitis ankaŭ Adelajdon. Ŝi tranoktis ĉe Indrani kaj Sandor. Surfote: Ĵunko kaj Ŝandor ĉe ge-Steeloj.

Amike,
Katja Steele

Lokaj Aŭstraliaj Esperanto-Kluboj **Listigitaj en la AEA ret-paĝoj kaj Aliaj**	Vidu AE184	Vidu AE185	Vidu AE186	Vidu AE187	Vidu AE188	Vidu AE189	Vidu AE190	Vidu AE191	Vidu AE192	Vidu AE193	Vidu AE194	Vidu AE195	Vidu AE196	Vidu AE197	Vidu AE198	Vidu AE199	Vidu AE200	Vidu AE201	Vidu AE202	Vidu AE203	Vidu AE204	Vidu AE205
AEA informas	xxxx	AE185	xxxx	AE187	xxxx	AE189	xxxx	AE191	xxxx	AE193	AE194	AE195	AE196	xxxx	AE198	AE199	AE200	xxxx	xxxx	AE203	xxxx	xxxx
Brisbana Esperanto-Societo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Brisbana Esperanto-Kafo-Klubo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Centra-Marborda Esperanto-Klubo	xxxx	AE185	AE186	AE187	xxxx	xxxx	xxxx	AE191	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto-Federacio de Nov-Sud-Kimrio	AE184	AE185	xxxx	AE187	xxxx	AE189	AE190	AE191	AE192	AE193	AE194	AE195	AE196	AE197	xxxx	xxxx	xxxx	AE201	AE202	AE203	AE204	AE205
Esperanto en Sudaŭstralio	AE184	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE189	xxxx	AE191	xxxx	xxxx	xxxx	AE195	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE203	xxxx	xxxx
Esperanto-Federacio de Viktorio	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE196	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto -Kafo-Klubo De Kanbero	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto-Ligo de Okcident-Aŭstralio	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE192	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto-programo de 3ZZZ Aŭstralia	xxxx	xxxx	xxxx	AE187	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE192	xxxx	xxxx	AE195	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Manlia Esperanto-Klubo	AE184	AE185	AE186	xxxx	AE188	xxxx	AE190	xxxx	AE192	xxxx	AE194	xxxx	xxxx	AE197	xxxx	xxxx	xxxx	AE201	xxxx	xxxx	AE204	xxxx
Melburna Esperanto-Asocio	xxxx	xxxx	AE186	xxxx	AE188	AE189	xxxx	AE191	xxxx	xxxx	AE194	xxxx	AE196	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE203	xxxx	xxxx
Melburna "Meetup" Grupo	xxxx	AE185	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE202	xxxx	xxxx	xxxx
Tasmania Esperanta Societo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Toowoomba Esperanto-Societo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Torkia Esperanto-Kafo-Klubo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Klubo de Noumea (Nov Kaledonio)																			AE202	AE203	xxxx	xxxx

"Informu AE, se estas eraro en la listo" rspring@tpg.com.au

"Ĉu via klubo funkcias?" Sendu informon.

Niaj Legantoj Komentas

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Roger Springer, Redaktisto, "Aŭstraliaj Esperantistoj".

Kara Roger

Gratulojn por la publikigado de la 200a eldono de la "Aŭstraliaj Esperantistoj".

La Aŭstralia Esperanto-Asocio tre dankas vin por via valora kaj sukcesa laboro.

Amike

Sandor Horvath, Indrani Beharry-Lall, Margaret Chaldecott, Esther Parris, Joanne Johns, Heather Heldzingen, Jonathan Cooper

La estraro de AEA

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Pat Palmer, trankvile forpasis



De: "Bob Felby"
Temo: Malĝojiga Novaĵo !!!
Dato: 16 Februaro 2015

Karaj Sudaŭstraliaj gesamideanoj !

Kun peza koro mi informas vin, ke nia kara membro kaj amikino, Pat Palmer, trankvile forpasis la nokton inter la 15-a kaj 16-a de februaro.

Miaj profundaj kondolencoj iras al Helen, Sandor kaj la ceteraj membroj de la familio, kiel ankaŭ al vi ĉiuj, kiuj konis kaj amis Pat!

Malĝojkore, Bob Felby


★★★★★

"Malĝojiga Novaĵo" jes, sed restos porĉiame en mia persona memoro ankaŭ ĝojiga lasta renkontiĝo. Antaŭ nur du aŭ tri tagoj, mi promenis (blindece, kiel kutime) laŭ koridoro en Hospitalo Adelajdo, kiam surprizis min du voĉoj kiuj ĝojplene alvokis min en Esperanto - Pat kaj Helen Palmer. Kvankam treege maldika, Pat ankoraŭ restis elstare vigla, amuza, ĝojplena eĉ dum mencio pri ebla operacio. Ŝia kontribuo al Esperanto en Sud-Aŭstralio estis kaj longe restos tre pozitiva.

Joseph Maxwell Wearing

Vortoj de "Lernu"

DIBOĈI



Malmodere manĝi, trinki kaj simile:
Petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu.
La vento diboĉis (furiozis) sur la kampoj.
Diboĉantaj gejunuloj ĝenis la najbarojn.
Tie regis diboĉado kaj drinkado.
Ĉu vi ne intencas ŝanĝi vian diboĉan vivon?
Mi ne volas, ke vi komuniku kun tiuj diboĉuloj, ĉar ili diboĉigas vin!
Li fordiboĉis / tradiboĉis ĉion ĝis la lasta ĉemizo.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★